BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



# Sonorilo

56a jaro n° 4

Julio - Aŭgusto 1964

# Sonorilo

oficiala dumonata bulteno de B.E.F.

redakcio : jaumotte maurice
roose fernand, sint-klaradreef 59, brugge tel. (050) 319.81
maertens grégoire
poupeye charles

kunlaborantoj al regulaj rubrikoj :
dr. pol denoël
durwael ivo isERENTANT ROGER de cuyper georges

administrado : terryn j. raapstraat, 72 gent



Belga Esperanto-federacio

asocio sen profita celo

sidejo & prezidantejo
debruynlaan 44, wilrijk tel. (03) 377758

honora prezidanto
kempeneers paul

honora vicprezidanto
sielens henri

ĝenerala prezidanto
jaumotte maurice

prezidantoj
debrouwere gerard, magdalenastraat 29 kortrijk
dro denoël pol, 10 rue v. raskin liège

unua vicprezidanto
roose fernand

vicprezidantino fakestrino por kongresoj
plyson j. 23, placo e. flagey, bruselo 5 p.k. 236804

vicprezidanto fakestro pri teknikaj rimedoj
verstraeten jules, sint bernardse steenweg 1078 hoboken

sekretario por la nederlandlingva regiono
maertens grégoire, prins leopoldstr 51, st-kruis tel. (050) 34935

sekretario por la franclingva regiono
de cuyper georges, 66, rue de dorlodot, monceau sur sambre


kasistino terryn juliette, raapstraat 72, gent

poŝtkonto de B.E.F. : 1634.34 raapstraat, 72, gent

ĉefdelegito de universala esperanto-asocio
fr. schellekens, frans hensstraat, 44, antwerpen 2
p.k. 9051.25


## La 46a Belga Esperanto-Kongreso

## en Wégimont apud Liego.



La akcepto en la urbo-domo Kliŝo: La Meuse

Se dum la antaŭa Esperanto-Kongreso en Antverpeno en 1963 konstante regis bela vetero, ni povas diri ke la ĵus forpasinta Belga Kongreso estis la daŭrigo : ne nur pro la vetero sed tre certe ankaŭ pro la nombro de partoprenantoj, pro la alloga ampleksa programa, pro la bona spirito kiu regis dum la tuta daŭro, pro la perfekta organizado, unuvorte pro la grandega sukceso kiu postlasis eksterordinaran, neforgeseblan impreson sur la gepartoprenintoj.

Dum la pentekostaj tagoj sabaton, le 16an, dimanĉon, la 17an kaj lundon, la 18an de majo en la kastelo de Wégimont — domeno aŭ bieno de la provinco de Lieĝo — 130 geesperantistoj partoprenis al la Belga Kongreso kies LKK ni citas ĉi sube :

D-ro Pol Denoël, prezidanto
S-ino Jeanne Grisard, vicprezidantino
S-ro Maurice Dengis, sekretario
S-ro Jean Pirard, redaktoro
S-ino Della Denoël, kasistino
S-ro Marcel Lemme, gazetara servo
S-ro Alphonse Kuster, loĝiga servo
S-ro Henri Dujardin, festorganizanto
S-ro Serge Denoël, junularaj aferoj
F-ino Elza Champy, membrino
S-ino Elise Dujardin, membrino
S-ino Germaine Kuster, membrino
S-ro Mathieu Guyot, membro

La kastelo de Wégimont estas je ± 15 kilometroj de la urbo de Lieĝo.

Granda parko ĉirkaŭas ĝin kun monteta tereno kie estas

ebleco naĝi, fiŝkapti, promeni, boatveturi, k.t.p., ĉio senpage por la gekongresanoj. Tra la grandega pordego de l'kastelo oni venas sur korto de kie — per majesta ŝtuparo — oni atingas grandan modernaspektan halon. De tie ĝis la akceptejo estas nur mallonga koridoro. En la akceptejo mem S-ino Della Denoël, larĝe ridetanta, kune kun diversaj LKK-anoj nin akceptis kaj transdonis la kongresajn dokumentojn en belaspekta, verdkolora mapo.

Ekstere sur la teraso funkciis « oficiala poŝtoficejo » kun speciala stampilo kaj tri oficistoj. Poŝtkartoj pri la kongresejo kun Esperanta teksto estis akireblaj.

Je la 13a horo la akceptejo malfermiĝis. Multaj kongresanoj jam estis surloke kaj daŭre alvenis novaj.

### Akcepto en la Urbodomo de Lieĝo

Je la 14,30a h. D-ro P. Denoël kun delegacio de la lieĝa grupo kune kun delegacio de BEF sin direktis al la urbodomo de Lieĝo kie ili estis akceptataj de la unua skabeno J. Raymond okaze de la jubileo de la grupo de Lieĝo pro ĝia 60-jara ekzistado.

### Oficiala Malfermo

Denove en la kastelo de Wégimont je la 17a horo okazis la oficiala malfermo. Sur la podio, flanke de granda, bele ornamita portreto de D-ro Zamenhof, sidis ĉe larĝa tablo, la prezidantoj de BEF, S-roj M. Jaumotte kaj G. Debrouwere kaj la prezidanto de la LKK, D-ro P. Denoël.

Tuj post la malferma solenaĵo BEF havis sian administrantaran kunsidon en kiu oni larĝe priparolis la eksiĝon de S-ro L. De Marré, ĝenerala sekretario de BEF. Oni ankaŭ akordiĝis pri la neceseco foje funde ekzameni la propagandajn rimedojn. La unua administrantara kunsido, dediĉota al tio, okazos en Bruselo dimanĉon, la 13an de septembro je la 10a h. en restoracio Monico-Nord, kiel kutime.

La tempon, kiu tiam restis, la kongresanoj uzis por vespermanĝi je tre favora prezo. En agrabla salono, freŝe kaj moderne kolorigita, ĉe oportunaj bel-aspektaj tabloj kun afablaj kaj helpemaj servistinoj oni havis la okazon-kaj la tempon ankaŭ-plifortigi la internan homon, ĝui la plezuron de la tablo kaj konatiĝi, unu la alian.

### Festvespero

En salono « Zamenhof » je la 20a h. S-ino Elise Dujardin, kiel paroladistino kun lingva lerteco, bonvenigis nin kore kaj amike promesante agrablajn horojn en distra, amuza sfero dum programo kiun la lieĝa grupo ĉefe prizorgis. S-ro Marcel Dengis sin montris lerta akordeon-muzikisto ; la antverpena grupo « La Verda Stelo » montris Esperanto-parolatan filmon pri « Lieĝo, arda civito » al kies Esp.-realigo kunlaboris S-roj J. Montmirail, Fr. Schellekens (la paroladisto), R. Van Eynde, H. Vermuyten (tradukisto) kaj J. Verstraeten. La lieĝa grupano Cyrille Bande aŭdigis diversajn kanzonojn ; eĉ unu kiun li mem tradukis kaj adaptis, kaj kiun oni multe aplaŭdis. Ke la lieĝa grupo cetere disponas pri talent- kaj promesplenaj aktoroj montris unue S-roj Serge Denoël kaj Alphonse Kuster en skeĉo « Tipa Ekzemplo » de R. Schwartz kaj poste Ges-roj Elise kaj Henri Dujardin en tre trafa nuntempa skeĉo « Psikologia Leciono ». S-ro D. Van der Stempel, de brusela grupo, alternis la tuton per pianomuziko plej arte prezentata. Inter 2 partoj de la vespero — laŭ iniciato de la lieĝa grupo — senpaga loterio faris multajn feliĉulojn aŭ -ulinojn gajnante unu el la multnombraj premioj havigitaj kaj disponigitaj de la sama grupo.

Por konkludi, helpata de sia filo Serge, D-ro Denoël montris filmojn de li verkitajn pri la pasintjara kongreso en Antverpeno kaj pri sia vojaĝo al Sofio, urbo de la Universala Kongreso en 1963. Finfine D-ro Denoël korege dankis ĉiujn kiuj kunlaboris al la sukcesigo de la bela vespero.

### La dimanĉa tago : Jubilea ceremonio

Je la 10a h. la kongresanaro denove kunvenis en la salono « Zamenhof » por ĉeesti la solenan ceremonion okaze de la 60-jara jubileo de Lieĝa Grupo Esperantista. Ĉe la honora tablo sidis S-roj M. Jaumotte kaj G. Debrouwere, D-ro P. Denoël kaj S-ro Brugmans, konstanta deputito de la provincestraro de Lieĝo. Post komuna kantado de nia himno « La Espero » S-ro Jaumotte, malgraŭ voĉmalfortiĝo pro malvarmumo, tamen brile bonvenigis la ĉeestantojn kaj kiel Prezidanto de BEF honorigis la jubileantan grupon. Premio kaj diplomo estis transdonatajn al ĝi ĉar ĝi gajnis la konkurson « Jennen ». Diversaj delegitoj de aliaj grupoj venis sur la podio por transdoni donacon aŭ florojn kaj honorigi la jubileantan grupon per laŭdaj, honestaj aŭ kortuŝaj vortoj kiujn S-ino Della Denoël akceptis kun neresistebla afableco. Tiel parolis nome de la naturamikoj : S-ro Burnelle ; de la karloreĝa grupo : F-ino A. Orsolini ; de la bruĝa grupa « Paco kaj Justeco » : S-ro Gr. Maertens ; de la reĝa bruĝa grupo : S-ro Ch. Poupeye ; de la brusela grupo : S-ro R. Jacobs de « La Verda Stelo » el Antverpeno : S-ro J. Verstraeten ; de la nederlandaj samideanoj : S-ro J. de Goej; de la germanaj samideanoj: S-ro Firmenich; de la fremdaj gastoj: S-ro Tshilombo (la afrika studento el lieĝa universitato) de « Heroldo de Esperanto » : S-ino A. Fighiera ; kaj nome de la lieĝa provinco S-ro Brugmans aldonis siajn gratulojn eĉ parte en Esperanto. Envenis multaj leteroj kaj telegramoj i.a. de D-ro Kempeneers, honora Prezidanto de BEF, de S-ro Fr. Schellekens, kiel ĉef-deligito nome de U.E.A., k.t.p.

Grupo kiu jubileas sendube havas pionirojn kiujn ĝi volas honorigi je tiu okazo. Ankaŭ la lieĝa grupo ŝatis festi tiajn fide-

lulojn. Estas S-roj Jean Desonay kaj Fernand Derigat ; S-ro Jaumotte transdonis al ili oran medalon pro merito kaj fideleco kiun li pinglis sur la brusto de la kortuŝitaj honorigitoj sub la spontana aplaŭdado de la ĉeestantoj, kiuj cetere plurfoje interrompis la solenaĵon por manifesti sian konsenton aŭ akordiĝon. Inter la diversaj eroj de la programo F-ino Tiny Bakker, violonistino akompanata de F-ino Annie Bakker je la fortopiano, nin regalis per kelkaj muzikaj intermezoj kies artaj niveloj nerezisteble kaptis la aŭdantaron en sia ĉarmo. Dum tiu kunsido ĉeestis ankaŭ S-ro R. Delord, direktoro ĉe la provinca administracio.

### Komuna Fotografado kaj Honorvino

La monumenta ŝtuparo kiu ligas la terason al la granda korto estis la ideala loko por kunigi la kongresanaron kaj okazigi la fotografadon. Kaj multaj jam tuj mendis tiun belan memoraĵon pri kongreso jam bele sukcesanta.

Tuj poste en la granda halo ni gustumis la honorvinon oferitan de la provinca registaro kaj trinkis je la daŭra sukceso de la kongreso, de la bonfarto de provincestraro, de la gekongresanoj.... sed tamen oni devis ie ĉesigi, se ne oni ebriiĝus.

### Tagmanĝo

Ĉiuokaze por multaj kongresanoj tiu honorvino estis vera aperitivo antaŭ la tagmanĝo. Efektive en la por la kongresantoj rezervita manĝejo baldaŭ regis festa atmosfero kiam oni formanĝis la bonegajn produktojn alvenintajn el la kuirejo. Precipe plaĉis al la geesperantistoj la sufiĉe longa tempo pri kiu ili disponas kaj kiu plurfoje en aliaj kongresoj mankas.

Posttagmeze la amatoroj de promenado povis ĝui agrablan ekskurseton tra la bela parko sub lerta gvidado kaj klarigado de S-ro H. Dujardin rakontante la diversajn historietojn (folklorajn kaj aliajn) de tiu parko.

La aliaj kongresanoj, kiuj ŝatis ripozi, restis sur la teraso en la dolĉa ombro de sunombrelo ĉe tablo por trinki bongustan tason da kafo aŭ glason da freŝa ŝaŭmanta biero.

### Honorigo ĉe tombo

Aliflanke malgranda delegacio, gvidata de D-ro P. Denoël, sin direktis al la enterigejo de Seraing kie oni demetis florojn sur la tombo de S-ro J. Soyeur, iama vigla sekretario de R.B.L.E. kaj Prezidinto de la lieĝa grupo, kaj kie D-ro Denoël en ĉeesto de la familianoj rememorigis la fidelecon kaj la grandajn meritojn de la mortinto.

### Katolika Diservo

En la belstila preĝejo de Soumagne, la tuj apuda vilaĝo ĉe la kastelo, estis celebrata la Sankta Meso. Lia kanonika moŝto,



S-ro Gillet klubano de la brusela grupo, rimarkinde predikis en Esperanto, legante la Evangelion kaj Epitron laŭ la nuna nova kutimo en la « popollingvo » kiu estis tie « Esperanto ». Esperantaj preĝlibretoj estis disdonataj el kiuj la kredantaro komune kaj laŭtvoĉe legis. Pluraj gekongresanoj partoprenis al la Sankta Komunio. La oficinto estis abato Swennen.

### Ĝenerala Kunsido de B.E.F.

Je la 18a h. denove en la « Zamenhof »-salono S-ro M. Jaumotte prezidis la ĝeneralan kunsidon de Belga Esperanto-Federacio. Ĉe la honora tablo li bonvenigis tutspeciale Prof. Ernest Natalis de la Universitato de Lieĝo, honora Prezidanto de la Kongreso, kiu ŝatis ĉeesti nian kongreson. S-ro Jaumotte alvokis la ĉeestantaron aliĝi al kaj pagi por la kongreso de 1965 en Ostendo. Jam 60 respondis tiun alvokon kaj formas tiamaniere la Honoran Kolonon ! Dum tre interesa parolado S-ro Gr. Maertens antaùmetis antaù la publiko tre serioze pristuditajn proponojn rilate la plej efikan propagandon de Esperanto inter la grande publiko kaj pli serioza helpo de niaj federaciaj membroj al U.E.A. Vigla aplaŭdo atestis pri la samopinio de la aŭdantaro.

Poste D-ro P. Denoël festparoladis pri temo « Valona Lingvo kaj Esperanto » ; temo kiun li pritraktis laù humorista maniero kaj kiu montriĝis tre valora precipe je propaganda vidpunkto.

---

### La Festeno

Belaj aspektis la tabloj kaj la salono kie okazus la festeno. Por ĝi enskribiĝis ± 80 personoj.

La BEF-prezidanto S-ro Jaumotte deziris al ĉiuj bonan apetiton kaj dum freŝkoloraj bukedetoj de floroj estis disdonataj al la sinjorinoj kaj fraùlinoj fare de ĉarmaj lieĝaninoj, oni komencis al festeno kies menuo promesis multan bonon.

La manĝaĵoj estis abundaj kaj precipe bongustaj. La sfero, kiu tie regis, estis amika kaj milda kaj plurfoje la ridoj, jen en angulo, jen je alia flanko de la tablo, aùdiĝis montrante la bonhumoron de la festenantoj, — bonhumoro al kies regado la bongusta vino certe multe helpis !

Profesoro Natalis, kiu ankaù partoprenis al la festeno, nepre volis montri sian esperantistemon kaj prelegis — en bonega Esperanto — altnivelan kaj idealistan « kvazaù »-ateston pri sia kredo en la finfina sukceso de nia kara lingvo. Oni ne ŝparis al li la bruan varman aplaùdon ! Daùre oni estis regalataj je diversspecaj cigaroj aù cigaredoj, tasko de S-ro Serge Denoël kun multe da eleganteco.

Post la festeno, por liberigi la salonon kaj permesi ĝian transformadon, la estraro de la kastelo oferis al la festenantoj kaftrinkadon en la manĝosalono, — oferado kiun oni akceptis senproteste kaj kun laùtaj ĝojkrioj.



Kliŝo: Le Peuple - Monde du travail

Je la 21,30a h. la kvaropa orkestro de Joseph Switten aŭdigis la unuan danc-arion kaj tuj la ĉeestantaj dancemuloj ekleviĝis. Ĉiuj sin sentis kaj kondutis junaj kaj ju pli malfruiĝis despli granda iĝis la entuziasmo kaj la bala sfero. La diversaj intermezoj : multobliga danco, vuala danco, ĉenera danco, k.t.p. estis tiom da fontoj por krei la ĝojon, la plezuron, la amuzon, la senzorgan distron.... S-ro Serge Denoël kaj liaj gepatroj estis senlacaj, same kiel la muzikistoj kaj la dancantaj gekongresanoj... ĝis finfine, post noktomezo, la prezidanto D-ro Denoël, afable sed senkompate, anoncis la lastan dancon....

### La lunda tago

Ankaŭ la lunda mateno sin anoncis same sunbrila kiel la du antaŭaj tagoj. Jam frue oni ellitiĝis kaj matenmanĝis. Akurate je la 8a h. du belaj, modernaj aŭtoĉaroj alvenis antaŭ la kastelo kaj antaŭvide al tuttaga kunesto la ekskursantoj eniris kaj forveturis en la direkto de Remouchamps kie oni vizitis la famajn grotojn. Klarigoj de lertaj kaj spertaj gvidistoj donis al ni pli ĝustan ideon pri la amplekseco kaj grandeco de la grotoj. Boatveturado dum la returna vojo kreis fabelan sferon pligrandigitan ankoraŭ per emociplenaj kantoj de S-ro F. Volders. Elirante la grotojn ni ricevis senpage belaspektajn broŝurojn pri ili.

Dumvoje al Trois Ponts ni preterveturis la grandiozajn akvofalojn de Coo kun la sensacia telelifto. Daŭre en ambaŭ aŭtoĉaroj gvidantoj klarigis la vidindaĵojn : S-ro R. Van Eynde en la unua veturilo, S-ro M. Lemme en la alia. En restoracio de Trois Ponts ni gustumis specialaĵon de la regiono : apraĵo en bongusta saŭco. Post la trankviligado de la stomakaj protestoj kaj paŭzeto por ĉirkaŭenrigardi ni daŭrigis la vojon al Stavelot.

En la muzeo de Guillaume Apollinaire la konservatoro, S-ro Armand Huysmans, nevo de Camille Huysmans, la ŝtatministro, nin bonvenigis kaj mallonge skizis la ekeston kaj evoluon de la muzeo. Dum ĝia mallonga vizito ni eksciis pli da detaloj el la vivo de la iom fama verkisto kun speciala stilo. Vid' al vide de tiu muzeo estis alia en kiu oni kolektas ĉiun ilaron koncerne la ledotanadon, iama industria aktiveco de tiu regiono. D-ro Denoël, kiu regule tradukis la franclingvajn klarigojn, dankis la konservatoron kaj dum la aŭtoĉaroj malrapide forfeturis la pasaĝeroj vigle kaj longe salutsvingis la manojn. tra belaj ardenaj pejzaĝoj kun abundaj arboj kaj kreskaĵoj kies verdaĵoj variis per centoj da diversaj koloroj, ni atingis Chevron, la famkonatan manufakturaĵon de minerala akvo. Ĉio tio post kelkaj obstakloj i.a. voj-eraro kun la konsekvenca tempordo kaj ekpluva vetero. Ĉar estis festotago la fabriko ne laboris kaj ni devis kontentiĝi per la teoriaj klarigoj de la gvidanto. Tamen je la fino ni estis agrable surprizataj per oferado de « citron-akvo » aŭ oranĝ-akvo » kiujn ni fortrinkis kun granda apetito. Klasika donaco de cindrujo, grandega krajono, libreto kaj reklama broŝuro pri la akvo de Chevron kunigitaj en plastika sako nin ankaŭ plikontentigis kaj en agrabla kaj milda sfero, malgraŭ la pluva vetero ni prenis la returnan vojon. Dumvoje la delegito de la lieĝa turisma servo sekretario Charles Jurdan, kiu nin akompanis la tutan tagon kaj kiu aktive partoprenis al la organizado de nia ekskurso, nome de tiu turisma servo nin regalis je trinkaĵo. Tio samtempe estis la konkludo de la vojaĝo, de la tago kaj de la kongreso. Oni rekondukis la gekongresanojn parte al la kastelo de Wégimont, parte al la stacidomo de Lieĝo kie oni disiĝis kun plej bonaj impresoj kaj kun la firma intenco partopreni la sekvontan jaron al la 47a Belga Kongreso en Ostendo.

## LA JUNULARA EN WÉGIMONT

— La propagandaj rimedoj de junaj Esperantistoj estas tre limigitaj. Sed ilia plej bona kaj efika propagando estas ilia gajeco ! Rakontante pri agrablaj renkontoj kaj amuzaj aventuroj dum esperantistoj kongresoj, oni plej multe allogas neesperantistoj. La vivĝojo estas LA junulara varbilo !... En tiu sence S-ro De Jongh, ĝenerala prezidanto de IFEF, parolis al la junularo dum la IFEF-kongreso en Bruselo. Kelkajn tagojn poste, en Wégimont, ni povis konstati la verecon. Kelkaj Lieĝanoj ĉeestis nur kiel simpatiantoj kaj entuziasmiĝis; Nicole X. ekz. komencis tuj post la kongreso studi Esperanton.

La kongreso estis vere signifplena por BEJA. Personaj kontaktoj inter ni, gejunuloj, daŭre plioftiĝas, sed neniam antaŭe ni formis tiel grandan grupon de BEJA-anoj. La elekto de 2 novaj estraranoj, Jeanine Chaineux kiel franclingva sekretariino, kaj Ernest Lernout kiel nederlandlingva vic-prezidanto serioze helpos nian progreson. Ambaŭ jam « ekfunkciis » kaj tiel pruvis sian laboremon.

Ni vere interamikiĝis kaj spontane formiĝis la plano por nova renkonto en Wégimont en julio... sed tion la sorte malebligis !

**Jam planoj por Oostende**

En Wégimont ĉeestis pluraj « novbakitaj » Esperantistoj kiuj ĵus aŭ eĉ ne finis la kurson. Sed ili ŝajne bonege amuziĝis. Por ankoraŭ plie instigi la novulojn al ĉeesto de la Belga kongreso, la estraro klopodos havigi al kiom eble plej multe da kursanoj el Belgio — malpli ol 26-jaraj kaj kiuj eklernos post apero de tiu-ĉi artikolo — la eblecon por senpage ĉeesti la Kongreson en Oostende en 1965 (kotizo + tranoktado repagotaj).

Ni ne jam fiksis la kondiĉojn por ekhavi tiun premion, ĉar ili dependos de la sumo kiun ni kolektos (eble de ĉiu loka kurso, la lernanto kiu faros la plej bonan ekzamenon).

Ni esperas akiri multajn libervolajn kontribuojn, ĉu de individuoj, ĉu de grupoj. Nia kasistino — Ingrid Maes, Sint Jacobsmarkt, 70 Antwerpen (Pĉk. 15.06.57) dankeme akceptos ilin.

Estraranoj jam donacis 600,— F. En proksima numero aperos listo de donacintoj.

Ivo DURWAEL

## GAZETARA SERVO

El letero sekve de artikoleto (de nia nederlandlingva informcentro) en la gazetoj :

« Je la fino de 1927, mi eklernis Esperanton per radiokurso el "Radio-» Belgujo » (stacio disaŭdiginta antaŭ la naskiĝo de l'Belga Instituto por » Radio-disaŭdigoj — la nuna B.R.T. —). La kurso konsistis el dek lecionoj » semajnaj kvaronhoraj (lernolibro: Esperanto 10 lec.), kun ensendo de korek-» totaj taskoj. Post kvar lecionoj, mi jam ekkorespondadis kun hungara » blondulineto dudekjara, lernintino tiotempe ĉe S-anoj Ferenc Szilágyi kaj » Julio Baghy (konataj hungaraj Esperanto-verkistoj). En 1932, dum Aŭgusto, » t.e. proksimume 5 jarojn poste, ni ekrenkontiĝis en Parizo, okaze de la » Universala Kongreso, kaj sekve, dum Oktobro de la sama jaro, geedziĝis en » Budapeŝto, hungara-belga Esperanto-paro. »

« Bedaŭrinde, pro kaŭzoj ekster nia volo, ekde tiam, Esperanton ni uzis » kvazaŭ neniam plu. Ve, trifoje ve, dum 31 jarojn ni sciadis certe pri la » ekzisto de la verda stelo, sed ĝi estis malaperinta malantaŭ problemoj » familiaj, ekkomence, kaj profesiaj, due.

« Tamen, kvankam perfektiĝo esperantlingve ne estus superflua por ni, » estas spertebla ke ni ne ĉion forgesis. Tio pruvu la taŭgecon de la Zamen-» hofa komunikilo internacia. Esperanto, iam lernita, estas ne-elcerbigebla. »

M. DE NEYER-KNEIZL

Kaj BEF gajnis du pliajn Bruslea fervorajn membrojn, dank'al la gazetaro servo kiu sendas du fojojn en la monato artikoleton al la redakcioj.



**PROF. D-RO HIDEO YAGI**

**Kun granda bedaŭro ni anoncas ke Prof. D-ro Hideo Yagi, Prezidanto de UEA, mortis la 6an de Majo, 1964 en sia 65a jaro.**

**Dum 28 jaroj li estis profesoro en la fakoj de ginekologio kaj akuŝa scienco en la universitato de Okayama, kies rektoro li fariĝis en 1959. Kiel Estrarano kaj Vic-prezidanto de la Internacia Federacio de Ginekologio kaj Akuŝa Scienco en Genevo li estis mondkonata.**

**Dum 46 jaroj li estis aktiva Esperantisto kaj verkis vortaron, lernolibron kaj multajn medicinajn artikolojn en Esperanto.**

**Li fariĝis Prezidanto de UEA en 1962 kaj je granda persona ofero prezidis la 48an UK en Sofio.**

**Li ne vidos la plenumon de sia tasko kiel prezidanto de LKK por la 50a UK en Tokio, kaj lia longa sperto tre mankos al la LKK.**

**Lia faka eminenteco donis prestiĝon al la movado kaj lia longa, fidela Esperantista laboro kaj alloga personeco karigis lin al ni ĉiuj.**

**Kun sinceraj sentoj ni honore memoros lin.**

**L. P. M. BECKERS ĈE LA PAPO PAŬLO VI-a.**

**La 19-an de majo, sep-nombra delegacio de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, gvidata de Pastro Beckers (Belgujo), ĝia prezidanto, kaj de Pastro Jacobitti (Italujo), prezidanto de la itala sekcio de IKUE, kaj F-ino Champy E. (Lieĝo), estis aŭdience akceptitaj de la Papo, Paŭlo la VI-a.**

**Dum la aŭdienco, la Papo alparolis ĉiun vizitanton, starigante plurajn demandojn pri Esperanto, pri ĝia taŭgeco, pri la nombro da ĝiaj adeptoj, pri la landoj, kie ĝi estas plej disvastigita, kaj pri IKUE.**

**Paŭlo la VI-a montriĝis tre surprizita, ekaŭdante, ke Esperanto estas tiel vaste konata en Oriento kaj Okcidento, kaj diris ke la Katolika Eklezio favore rigardas kaj kuraĝigas ĉiun klopodon por la interkompreno de la popoloj.**

**Pastro Jacobitti siavice proponis enkondukon de Esperanto inter la lingvoj uzataj de Radio-Vatikano. Fine de la aŭdienco, oni transdonis al la Papo kelkajn memordonacojn, inter alie du jarkolektojn de « Nova Civito » (katolika revuo), kvin jarkolektojn de « Espero Katolika » kaj aliajn katolikajn librojn en la internacia lingvo. La Papo petis Pastron Jacobitti transdoni sian adreson por eventualaj komunikoj pri la temo.** (el raporto de R. Maudente)

LA REDAKCIO PETAS
ENSENDOJN POR LA
Septembra - Oktobra numero
PLEJ LASTE JE LA 16.8.1964
ANTAŬ DANKE

# GRUPA VIVADO

**ANTVERPENO ESPERANTO-GRUPO « LA VERDA STELO »**

**Kunsidoj : Ĉiuvendrede en « Witte Leeuw », Frankrijklei, 4 je la 20,15a h. Poŝtĉeknumero : 726.54**

**NEKROLOGO**

**Kun bedaŭro ni eksciis la subitan morton de S-ino Louise Lausanne, tre konata en la antverpenaj teatro-medioj : dum longaj jaroj ŝi aktive laboris tie kiel fama artistino. Ŝi estis la patrino de niaj bonaj kaj fidelaj membroj, Ges-roj Henri Sielens.**

**Al ŝia bofilo, honora vic-prezidanto de BEF, ŝia filino Magda kaj la aliaj parencoj ni prezentas niajn sincerajn kaj profundajn sentojn de kondolenco.**

La 27an de marto S-ro L. De Marré paroladis dum la Sankta Vendreda atmosfero pri la fiksado de la dato de Pasko kaj priparolis ankaŭ la kalendaron en la pasinteco konigante la nunajn proponojn por la nova (pli praktika kaj pli simpla) kalendaro.

Dum la 3a de aprilo (pro formo anoncita kiel « Parolata Jurnalo » por superruzi S-ron M. Jaumotte kaj edzinon) oni festis la 65an datrevenon de la Prezidanto M. Jaumotte en intima sfero. La salono estis plenplena de gemembroj (pluraj malnovaj) kiam S-ro J. Verstraeten enkondukis la vesperon kaj laŭdis la meritojn kaj kvalitojn de la jubileanto. S-ro L. De Marré faris biografian skizon de lia vivo kaj S-ro R. Van Eynde, nome de EKI-Antverpeno de kiu S-ro Jaumotte ankaŭ estas la Prez., ne ŝparis la laŭdajn vortojn. S-ro H. Sielens tre sprite parolis kiel malnova amiko kaj S-ro G.C. Fighiera, speciale alveninta el Bruselo, aldonis tre kortuŝajn vortojn nome de la eksterurbanoj. Ankaŭ S-ino L. Bernaerts deziris esprimi vortojn de simpatio kaj admiro kaj tiuokaze memorigis multajn okazintaĵojn el la pasinteco. Dume la ĉeestantoj estis regalataj per santviĉoj kaj ŝaŭmvino kaj plurfoje post la paroladoj oni estis invitata levi la glason je la honoro de la Prez. ! S-ro L. De Marré transdonis florojn al S-ino Jaumotte dum la prezidanto mem ricevis belan artan donacon. S-ro F. Schellekens faris multajn fotografaĵojn kaj la sekretario legis multajn telegramojn kaj leterojn alvenintajn el la tuta lando kaj eksterlando. Finfine S-ro M. Jaumotte, ankaŭ nome de sia edzino, emociiĝinte dankis pro tiom da honoro kaj esprimis la esperon ke la grupo, tiel kara al li, povu daŭrigi sian brilan kaj kreskantan vivon kaj ekziston. Tondra aplaŭdo kaj postkunsida babilado inter malnovaj amikoj kaj konatuloj konkludis tiun belegan memorindan vesperon.

La 10an, laŭ propono de S-ro I. Durwael, oni invitis S-ron Roger Bogaerts ne-esperantisto kaj ne-membro, paroladi pri « Egiptujo ». Li estas studento de la Akademio por Belaj Artoj, sekcio arhitekturo. Estis precipe sur tiun temon ke la paroladisto metis la akcenton dum li montris amason da belegaj kolorigitaj diapozitivoj — pluraj eĉ grandvaloraj pro ilia malofteco — kaj agrabligis la tuton per rakontado de personaj travivaĵoj kiuj vekis amuzon kaj bonhumoron inter la aŭskultantoj. Ĉar la parolado estis en nederlanda lingvo S-ro Jaumotte ĝin enkondukis en Esperanto.

La 17an S-ino R. Lecat prelegis pri sia « Vizito al Kanado kaj Novjorko ». Ĉar la paroladistino efektive dum pluraj semajnoj restadis en tiuj regionoj ŝi povis paroli kun multe da konvinko. Ŝi multe detaligis pri la geografio de Kanado kaj pri Novjorko ŝi ne havis tiun grandan kaj imponan impreson kiel la famo de tiu urbo volas kredigi. Dankvortoj de la Prez. kaj aplaŭdo de la publiko certe rekompencis la paroladistinon pro ŝia penado. Krom la prelego ŝi prezentis ankoraŭ abundajn lumbildojn diversaspektajn.

La 24an S-ro Maur. Jaumotte revivigis antaŭ la okuloj de plenatenta ĉeestantaro « Ĉion, kio okazis dum la antaŭaj 65jaroj ». La Prez. bezonis pli ol 2 horojn por montri ĉiujn personajn, familiajn, esperantajn, profesiajn kaj aliajn travivaĵojn kiujn li ĉeestis dum la 65 jaroj de sia ekzistado en tiu ĉi mondo. Li vekis multan amuzon per sia famkonata « humorplena » sed klara alrigardo al la ĉiutaga vivo kaj certe ankaŭ la plenan admiron de ĉiu pro liaj kuraĝo kaj vivoĝojo eĉ en la plej malfacilaj cirkonstancoj. Pro la sennombraj lumbildoj — el la malnova kiel el la nova tempo — la ĉeestantoj estis agrable surpizitaj kaj ili ne ŝparis sian aplaŭdon je la fino.

La 1an de majo ne estis kunveno pro festotago.

Ĵaŭdon, la 7an, preskaŭ plena aŭtoĉaro jam frumatene sin direktis al la « Vlaamse Ardennen ». S-ro J. Lernout gvidis tiun ekskurson kaj sin konigis ne nur kiel « humuristo », sed ankaŭ kiel spertan arhitekton kies kono pri la malnova arhitekturo vere estas profunda kaj multaspakta. S-ro R. Van Eynde ofte pretis sian kunlaboron per klarigoj pri folkloraj aŭ historiaj sciindaĵoj de la regiono. Vizito al la kripto de Ronse sub la preĝejo, vizito al la naskiĝdomo de Peter Benoit en Harelbeke, vizito al la « Groeningheveld » en Kortrijk estis tiom da celpunktoj el tiu ekskurso. Ĝi bonege sukcesis grandparte ankaŭ pro la plensuna vetero kiu regis dum la tuta vojaĝo.

La 8an dum sia parolado « Ni lernas legi en Esperanto » S-ro H. De Roover klarigis la nunajn modernajn metodojn per kiuj oni instruas al la nuntempaj infanoj. Estante mem instruisto, la paroladisto — pli ol kiu ajn — povis enprofundigi la ĉeestantojn en la multajn problemojn kiuj ekestas dum tiuj instrumetodoj kaj la rimedoj ilin solvi. Li kvazaŭ donis veran demonstracion dum sia parolado uzante la ĉeestantojn kiel 6-jarajn infanojn. Tio kaŭzigis plurfoje amuzajn situaciojn plifortigitan ankoraŭ per la ŝercema maniero laŭ kiu la profesoro prezentis siajn metodojn. Ĉio tio donis al la parolado apartan ĉarmon.

La 15an S-ro R. Van Eynde foje pli prizorgis la dokument-film-vesperon kaj prezentis 4 kolorfilmojn ; 1 estis en Esperanto. « En la Lando de Godefrido de Bouillon » estas adaptita de la tehnika sekcio : S-roj J. Montmirail, H. Vermuyten kaj J. Verstraeten.

La 16an/17an/18an pli ol 25 verdstelanoj partoprenis al la Belga Kongreso en Wégimont kaj ĝuis 3 agrablajn nekompareblajn sunplenajn tagojn. Cetere la kongreso iĝis granda sukceso.

Tio montriĝis dum la kunsido de la 22a kiam oni raportis pri la kongreso : S-ro R. Van Eynde, S-ino M. Lemmens (kiu raportis por la unua fojo), S-ro F. Jacobin (nova entuziasmulo kiu rimarkinde raportis laŭ humurista maniero), S-ino L. Merckx (kun amuza aldono de persona postkongresa travivaĵo), S-ino J. De Hondt (kiel veteranino : bonstila kaj akurata), S-ro H. Vermuyten (kun poezia superrigardo super la tuta kongreso) kaj J. Verstraeten. Speciale citinda estas S-ino M. Goossens kiu donis sian ĝeneralan impreson de la kongreso, — impreso kiu estis tiel bela kaj impona ke ŝi publike konfesas sian konvinkiĝon kaj kredon en la taŭgeco kaj utileco de Esperanto. Ĉio tio en flua, belsona lingvo elparolita laŭ senerara maniero kaj ligita kun sentemo kaj komprenemo ! Bonega konkludo por tia vespero.

Dimanĉon, la 24an en la kadro de EKI « Promen-Ralio » tra la urbo estis organizata kun bona sukceso. Estis S-roj C. Borremans kaj E. Paesmans kiuj ĝin gvidis kaj kiuj meritas plenan laŭdon pro sia kompleta dediĉo al tiu tasko. La vetero estis bonega, la interesо sufiĉa kaj la konkluda kunsido en « Witte Leeuw » poste estis ege kontentiga ĉar ĉiu partopreninto ricevis premion.

La 29an oni faris la tradician ĉiujaran viziton al la antverpena kermeso. Regis bela vetero, bonhumoro inter la partoprenantoj kiuj multe amuziĝis kaj ridis kaj sin sentis dum kelkaj horoj senzorgaj, pli junaj kaj plej feliĉaj. Oni konkludis tiun « distran » programon en bufeda salono per gustumado de vafloj, kukoj, kafo aŭ teo, k.t.p.

La 6an de junio S-ino E. Riadis kaj S-ro Eug. Paesmans paroladis pri Grekujo. Se la paroladisto precipe akcentis la historian flankon de tiu lando de kontrastoj pere de trafaj bildoj kiuj pliigis ankoraŭ ĉies estimon por la granda kulturo greka, la paroladistino, kontraŭe, skizis la karakteron de la nunaj grekoj pere de anekdotoj, spritaĵoj kaj muziko sur diskoj. Filmo kaj kolorigitaj diapozitivoj akompane ilustris la tuton.

La 12an dum solenaĵo diplomoj estis disdonataj al la gelernintoj de la lasta elementa kurso. Estis escepte bona rezulto ĉar ĉiuj ekzamenitoj akiris pli ol 70/100 de la poentoj. Ricevis el la manoj de la Prez. S-ro M. Jaumotte diplomon kune kun broŝuro pri la historio de « La Verda Stelo » : 1. S-ro Mark De Roover, 2. S-ino Mia Goossens, 3. S-ro Frans De Ley, 4. S-ro

Robert Steymans, 5. S-ino Anna Leflot, 6. S-ino Maria Ejsmont. Nome de la gelernintoj S-ino Mia Goossens — en bonega Esperanto — dankis la profesoron S-ron H. De Roover, kaj transdonis belan donacon (Esperanto-traduko de Gösta Berling de Selma Lagerlöf). S-ro H. De Roover sprite respondis kaj dankis. Por kompletigi la vesperon li cetere mem faris paroladon pri « La Farmacio tra la Jarcentoj » kun lumbildoj kaj plue S-ino Fr. De Roover paroladis kaj montris vere artajn diapozitivojn pri « Vojaĝo tra la regiono de l'Ardèche en Francujo ».

La 19an en sia parolado « La Vivo de Etuloj en Infanejo » S-ino J. De Hondt per vortoj kaj filmo + diapozitivoj gvidis la aŭdantaron al Fröbellernejo kaj donis al ili plej bonan okazon kunvivi kun infanoj tutan tagon en infanejo. Ŝi dume komparis nunajn kun antaŭaj eduk-metodoj, substrekis la bonegajn rezultojn akiritajn je eduka vidpunkto kaj konkludis per esprimo de sia fido kaj kredo en la junularo de morgaŭ. Ŝi entute meritis la aplaŭdon de la ĉeestantoj kaj la laŭdajn vortojn de S-ro R. Van Eynde kiu funkciis kiel anstataŭanta prezidato dum la libertempa foresto de Prez. M. Jaumotte.

La 26an S-ro R. Van Eynde — kiel kutime vigle helpata de la tehnika sekcio — bone kaj zorge flegis la dokumentan filmvesperon kiu pritraktis faktojn pri Kanado.

**B R U Ĝ O**
**BRUĜA GRUPO ESPERANTISTA,**
**Reĝa Societo**
**Poŝtĉekkonto N° 4835.33**

La 28an de aprilo okazis lernigaj ludoj. La 5an de majo, Sro. R. Jacobs, prez. de la Brusela Grupo, faris antaŭ multnombra ĉeestantaro tre interesan paroladon pri « Andaluzio » samtempe projekciante multajn belegajn kolordiapozitivojn. Ĉeestis ankaŭ invititoj el la Grupo « Paco kaj Justeco » kaj kelkaj ne-esperantistaj interesuloj.

La 12an okazis debato « Por aŭ kontraŭ kermesa foiro ».

Multnombra delegacio de la grupo ĉeestis la 16an, 17an kaj 18an de majo la 46an Belgan Kongreson en Lieĝo (Wégimont) kaj multe ĝuis ĝin.

La 2an de junio okazis paroliga portretludado.

La 9an, Sro. D. Demeulenaere gvidis interesan konkursludon pri historiaĵoj kaj aktualaĵoj.

Dum la unua parto de la kunveno de la 16a de junio, okazis komitata kunveno, kiu decidis pri la somera kaj postsomera programo. La lasta parto estis dediĉata al esperanta kartludado.

**Programo por estontaj kunvenoj**

Kunvenejo : « Strijdershuis », Hallestraat, N° 14, Tel. N° 347.98.

Dum julio kaj aŭgusto, pro libertempo, la kunvenoj okazos nur dufoje monate, ĉiam marde je la 20-a horo, laŭ ĉi suba programo :

AŬGUSTO : 4an : NE kunveno. — 11an : 49a Universala Kongreso de E. -F-ino M. Willems. — 18an : NE kunveno. — 25an : Legado kaj tradukado.

Ek de septembro la kunvenoj okazos denove **ĉiumarde**, je la 20a horo :

SEPTEMBRO : 1an : Lastaj impresoj pri libertempo. — 8an : Parolado de Sro. J. Eneman « Itala Flormarbordo ». — 15an : Nova elementa kurso. Alparolu de nun viajn familianojn kaj konatulojn. La sukceso de tiu kurso dependas de VIA varbado !

**B R U S E L A**
**REĜA ESPERANTISTA GRUPO**
**Kunsidoj : ĉiulunde en «Monico Nord» 2, Brabanto strato, Bruselo-3.**

La 6an de Aprilo okazis la parolata gazeto; kunlaboris al ĝia sukceso diversaj gemembroj. La 13an Fino Daems, M. gvidis amuzan vesperon ; la sociaj ludoj amuziĝis la ĉeestantojn ; La 20an Sro van der Stempel, David donis sian ĉiumonatan perfektigan kurson, kaj la 27an Sino Lecat, Rena paroladis pri « Kanado kaj Novjorko ». Ŝi sukcesis kapti ĉies atenton. Unue per la teksto mem due pere de abundaj kaj belaj bildoj, kiujn vidigis al ni Sro Schellekens.

La 4an de Majo, la kutima parolata ĵurnalo okazis ali-maniere. La membroj de la grupo (A) prelegis temojn kaj poste la membroj de la grupo (B) devis debati tiujn temojn. Sro van der Stempel akiris la plej multe da poentoj pere de la temo « Aŭtoroj kaj Scenistoj ». La 11an, « Esperanto kaj Volapük » estis la temo elektita de Sro Castel, H. La paroladisto faris komparojn inter du artefaritaj lingvoj, je diversaj vidpunktoj, substrekante la belsonecon de la nia kaj la neelparoleblecon de la alia. La 18an ne okazis kunveno pro pentekosta festo ; kaj la 25an la gemembroj debatis pri la enlanda kongreso de Wégimont.

manufakturaĵo firmo DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216 54

VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ

" MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko

la perfekta konfekcio

fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj

PRECIPAJ CENTROJ:

| | | |
|---|---|---|
| Antwerpen | : | Aalmoezenierstr. 2 |
| | | Abdijstr. 57 |
| | | Anselmostr. 17 |
| | | Nationalestr. 87 |
| Arlon | : | Marché-aux-Légumes 16 |
| Brugge | : | Breidelstr. 8 |
| Brussel | : | Galerie d'Ixelles 9 |
| | | Anspachlaan 194 |
| Eupen | : | Kirchstr. 14 |
| Gent | : | Brabantdam 25 |
| Herstal | : | Rue Large Voie 4 |
| Leuven | : | Bondgenotenlaan 29 |
| Luxembourg | : | Place de la Gare 67 |
| Mechelen | : | Grootbrug 8 |
| Roeselare | : | Ooststr. 124 |
| Tournai | : | Rue Royale 75 |
| Turnhout | : | Herentalsstr. 6 |
| Verviers | : | Pont St. Laurent 2 |


— Presita en Belgujo de H. De Baene-Sercu, Delaplacestraat 9, Sint-Kruis Brugge —